FN PER ANC 47

N°253 MARTO 2013

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

# ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.



17 - 18an de novembro 2012a. Staĝo kun Svetlana SMETANINA

## Post la novembra staĝo en Hérouville. Komentoj :

*Jen la unua komento de staĝantino kiu unuafoje kaj entuziasme malkovris esperanton. Ŝi sendis tion tuj post la fino de la staĝo:*

*Nova esperantistino skribas*

« Saluton ! La pression et l'effervescence sont retombées seb (*sed*) mi estas sur unu nubeto. Enchantée d'avoir vécu avec vous tous, encadrants et stagiaires, ce fameux stage d'initiation, me voici boostée por labori ofte kaj lerni rapido (*rapide*) ! »

Dankon kaj kisojn. Baldaŭ ! (*Ĝis baldaŭ* !)

Martine à la mer.

*Jen alias komentoj, ĉu en la franca, ĉu en la esperanta (eltiraĵoj de la personaj bilancoj)*

- Tre bona staĝa etoso

- Densega staĝo, altvalora je la enhavo.

- Tre bona kaj ofte amuza sperto

- Kia laboro !!! Sed kia plezuro !

- Estis mia unua staĝo. Al mi plaĉis partopreni dum du tagoj en la kurso de **Svetlana**. Mi ne progresas rapide, sed mi opinias tamen ke la venonta staĝo estos pli bona.

- Ce stage me permet de comprendre que pour réussir, il faut travailler.

- Conditions matérielles parfaites. L'accueil était très chaleureux.

- Des locaux tout à fait adaptés et très agréables, un accueil des plus sympathiques

- J'ai passé deux journées bien remplies, studieuses et dans la bonne humeur.

- Stage très réussi. A renouveler.

- J'ai apprécié la passion, le sérieux et la bienveillance de tous.

- Excellent stage qui a permis de bons échanges et un approfondissement des connaissances en espéranto. A renouveler.

- Pour un premier stage, je suis très satisfaite. Ce furent deux journées intenses.

- Rythme intensif permettant une immersion rapide et une impression de progression élevée.

- Stage intensif et enrichissant: telles étaient ma demande et mon attente. Belle réussite et bravo ! Je reviendrai sûrement.

- Mi ŝatus paroli esperante kiel **Svetlana SMETANINA** !

- Cours très clairs, très intéressants, très instructifs, très agréables.

- Une grande professionnelle ! Qui a compris que: " Former n'est pas remplir un vase, c'est allumer un feu » (Aristophane)

- Il aurait pu exister aussi une période de cours commun avec les débutants pour que ceux-ci apprécient (peut-être plus) la langue.

- Le groupe des "progresantoj" était un peu trop étoffé.

- On ne sait pas ce que l'autre groupe a fait.

***(34 personoj partoprenis tiun staĝon.)***

## En tiu numero :


| | |
|---|---|
| Mikaelo Bronŝtejn. | 2 |
| **Coutances** : licea kurso. | 2 |
| Vizito de Uzbekio. | 3 |
| Grupo de **Flers**. | 4 |
| Jaltaj aventuretoj. St Pierre de **Varengeville** | 4-5 |
| Lingva ludeto. | 5-6 |

# Mikaelo Bronŝtejn konferencis dufoje en Hérouville St Clair la 5an de januaro.


La unua konferenco, ruslingve, kunvenigis 50 personojn en salono Pouchkine por prezenti la fratojn Strougatski, famajn sciencfikciajn aŭtorojn. Mikaelo havis amikajn rilatojn kun Boris, la plej juna el la du fratoj, kiu antaŭnelonge forpasis. Li tradukis plurajn iliajn verkojn ; li enigis nin en ilian universon kaj permesis ke ni pli facile komprenu ilian sukceson en Soveta Unio kaj en nuna Rusio same kiel en multaj landoj.

La dua interveno okazis en la urba biblioteko antaŭ 30 personoj kiuj venis por malkovri aŭ aprezi liajn esperantlingvajn literaturajn verkaĵojn, liajn kantzonojn, lian vervon kaj lian humuron.

Tri membroj de la asocio « Larimaquoi » legis nove tradukitajn novelajn eltiraĵojn. Tiuj novaĵoj estis ilustritaj fare de membroj de « Hérouville-Esperanto » el lia novelaro kiu aperis en 2009 sub la titolo :

**« Lecionoj por knabo ».**





# Coutances : instruado en liceo.

Mia edzino, Odile, kaj mi komencis lerni Esperanton antaŭ proksimume 4 jaroj. Ŝi instruis la anglan kaj mi fizikon. Mi ne estis bona lingvolernanto pro memor-kapablo, sed tiun logikan lingvon mi facile eklernis. Mirakle !

Kiam mi emeritiĝis, mia eksdirektoro de la liceo „Jean-Paul la Dua" en Coutances akceptis, ke mi instruu Esperanton kadre de nedeviga kurso po unu aŭ du horoj semajne. La bibliotekistino ankaŭ multe helpis min disdonante E-kalendaretojn kaj afiŝante E-dokumentojn.


Mi miris, ke por tiu unua kurso, prezentiĝis gejunuloj kiuj antaŭe neniam aŭdis informojn pri tiu lingvo. Ili venis nur pro scivolemo. Sed, mi feliĉe konstatis, ke tiuj interesataj kaj simpatiaj lernantoj ŝatas partopreni la kurson (vidu la foton) pri tiu bela kaj logika lingvo. Inter miaj E-amikoj, mi trovis tri instruistojn el



Japanio, Vjetnamio kaj Rumanio, kiuj akceptis rete korespondi kun miaj lernantoj. La lernantoj, lertaj en la uzo de la reto, videble ŝatas tiun internacian rilaton kiu espereble daŭre sukcesos

15/20 horoj kompreneble ne sufiĉos por bone scipovi la lingvon sed mia celo estas, ke ili poste daŭrigu mem la lernadon.

***Philippe BONY***



*Surinamo. Poŝtmarko*

*1987a februaro.*

*100 jaroj de Esperanto.*

## Ĉu vi jam vizitis Uzbekion ?

Se ne, ekiru rapide tiun landon !

Vi povos admiri la plej belajn monumentojn, la plej belajn medreseojn, maŭzoleojn, moskeojn, kupolojn, ĉiuj bele ornamitaj de mozaikoj kaj majolikoj diverskoloraj.

Jes ja, longajn horojn vi povos admiri ilin. Ankaŭ vi povos konatiĝi kun Amir Timur (Tamerlan en la franca) kaj kun Ulug Beg, lia nepo, la fama astronomo "Princo de Steloj" kiu kalkulis, en la XVa jarcento, la daŭron de la jaro kun nur du minutoj da eraro.

Ankaŭ vi nepre konatiĝos, en Bukaro, kun Nasredin Koĝa, la eble plej fama saĝulo de la tuta islama mondo. *

Plie vi renkontos tiom da homoj afablaj, ĉarmaj kaj toleremaj.


Kiel fari ?

Aŭskultu mian konsilon.

Konsultu Pasportan Servon. En Samarkando vi trovos viron kiu nomiĝas Anatoli Ionesov. Por esperantistoj, li ĉiam estas disponebla 25 horojn tage kaj 8 tagojn semajne, unue por prepari vian programon, due surloke por ĉiookaze helpi vin. Fakte li mem ne preparis la programon kaj la itineron, sed lia amiko Rafik kiu estras malgrandan vojaĝagentejon en Samarkando. Tiu Rafik organizos ĉion, efike prizorgos vin, ĉiam disponebla por vi.

Ekiru rapide Uzbekion, vi ne bedaŭros ! Starantaj sur la fama antikva Silka Vojo, Samarkando, Bukaro kaj Kivo restas neforgeseblaj vizitindaj urboj.

*Gigi SÉNÉCAL*




### * Du rakontoj pri Nasredin Koĝa :

Iun tagon, iu loĝanto de Bukaro demandis Nasredin:

- Koĝa, kiom da amikoj vi havas ?

- Mi ne povas diri nun, ĉar tiun jaron la rikolto estis abunda kaj mi tre bone vivas. Mi respondos kiam alvenos la venonta jaro de malsatego.

---

Tiam Nasredin estis imamo de la vendreda moskeo. Li predikis:

- Alaho, la plej potenca, kreis la teron kaj la ĉielon post ses monatoj.

La aŭskultantoj tuj reagis:

- Tute ne ! Tute ne ! Vi eraras Koĝa ! Ne post ses monatoj sed post ses tagoj !

Nasredin respondis:

- Nu ! Mi bone scias tion ! Certe mi bone scias ... sed ... se paroli sincere, mi opinias , ke neniu tion povas kredi !

**LITOVIO.**

2005.

90a Universala Kongreso en Vilnius.

Portreto de Zamenhof.



# Grupo de Flers


En loka Asocio de Solidareco kun enmigrantaj laboristoj (ASTI) estas reciproka interŝanĝo de scioj, kie Anne-Marie LEPREVOST proponis Esperanto-lernadon.

Ekde novembro 2011, 11 homoj kuniĝis pri esperanto. Unu pro sia laboro ne ofte parto-prenis, du aliaj rezignis pro tro da klopodoj aŭ pro itala kurso. Poste, aliĝis lernantino kiu rete malkovris nian grupon. Ĝis junio 2012, ni nur uzis la naŭ unuajn lecionojn de la « rekta metodo » de Stano Marček, sub la klera ĉe-esto de Zef*.

Ekde septembro 2012, ni unue kantas aŭ legas poemeton kaj poste daŭre studas per la « rekta metodo ». En novembro, ni komencis malkovri «Amuzaj Dialogoj »-n kiun donacis Petro Kijo (Rouen) dum la lasta Normanda Asembleo. Nian kurson ĉeestas 8 homoj ĉiun mardon de 14h30 ĝis 16h15 en « Maison des Activités » Emile Halbout, 2 rue Pierre Lemière, 61 100 Flers.

***Anne-Marie LEPREVOST***

* Zef loĝas apud Flers. Li estas fama pro siaj tre longdistancaj bicikladoj, i.a. de St Brieuc ĝis Vladistoko, kun ofta uzo de la internacia lingvo.



Antaŭnelonge, tri malnovaj kaj agemaj membroj de nia regiona asocio forpasis : Sroj France **GUERRE** kaj Albert **BESSIÈRE** el Rouen kaj Freddy **TALPIED** el Caen. Ili pace ripozu ! Nekrologaj artikoloj aperos en la venonta numero de Normanda E° Bulteno.

# Jaltaj aventuretoj...

En 2012, la SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kongreso okazis en Jalto, Krimeo, kiun partoprenis avino el normanda urbeto. Ŝi uzas nek interreton nek poŝtelefonon kaj pro tio baraktis en survojaj aventuretoj.

Jam en Parizo, ne simplis la afero por atingi la flughavenon per aŭtobusoj ne plu funkciantaj, kaj RER ne iranta ĝis Roissy ! Tie, la manpakaĵo estis draste kontrolita kaj nia avino devis rubujen ĵeti akvobotelon kaj kontraŭsunan kremujon. La flugo de Parizo al Kievo senprobleme okazis sed la duan aviadilon al Simferopolo malfruigis fama pasaĝero. Konsekvence, neniu plu atendis nian avinon. (Fek' al la moŝtuloj ! -la redakcio.-)

En la bruega flughaveno, per malmultaj anglaj vor-toj, ŝi malfacile klarigis sian situacion al oficistino kiu finfine sukcesis kontakti kunorganizanton de la kongreso. Kiel elturniĝi ? Ĉu atingi Jalton per tak-sio, trolebuso, buso ? Komplike. Tre malfruis, nok-tis. Lingva baro, sensukcesa uzo de kelkaj krimeaj vortoj kaj ne scipovo de la rusa : kiel esti kompren-ata kaj bonpreze marĉandi la pakaĵtransportadon ? Kaĉo !

Finfine, ŝi atingis Jalton post duhora busa vojaĝo sur ligna banko, premata kiel sardeno en ladskatolo inter multnombraj vojaĝantoj kaj iliaj ne stabilaj pakaĵoj. Dorsodoloroj tamen estis duone forgesitaj pro ridaj interŝanĝoj kun la najbaroj okaze de ĉiu skuo laŭ la zigzaga vojo.

Post multaj haltoj, jen Jalto. Tie, nia avino estis informita, ke ekzistis karavano por senprobleme atingi la kongresejon kies adreso antaŭ nelonge est-is ŝanĝita... sed la senretaj kongresantoj ricevis neniun klarigon !

Post tiom da aventuretoj, nia avino ĝoje konatiĝis kun francaj, hispanaj, rusaj kaj ukrainaj SAT-anoj kaj plezure revidis Colette kaj André Weiss kiuj prizorgas la pacistan fakon de SAT . Ili esperant-igis kaj disdonis la libron « Gurs 1939-1945 ».

Dum la kongreso, ŝi ĉeestis tre interesajn kaj viglajn prelegojn, i. a. de rusa ĵurnalisto, de bulgara sindikatano, de kazaĥa fotistino pri la tieaj situa-cioj laboraj kaj sociaj. Profesorino priparolis la Moskvajn Internaciajn Festivalojn pri lingvoj kaj kiel ili evoluis.

.../...


.../...

Hispano prezentis filmon pri fama ukraina kamparano, Nestor Maĥno, kiu batalis kontraŭ la bolŝevistoj kaj la blankuloj dum la terura Civila Milito.

Ankaŭ interesa estis la turista programo en tre vizitinda Krimeo. La kajoj de Jalto, la antikvaĵoj de Sebastopolo, la Alupka palaco, ŝipado, paŝado en "la klifa valeo de la 3 montoj"... baldaŭ estis forgesitaj la malfruaj aviadiloj, la fakiraj bankoj, la plenŝtopitaj busoj.

Vivu SAT, vivu la kongreso 2013 en Madrid !

*Anne-Marie LEPREVOST* (Flers)




Ĉiam regas simpatia etoso dum la akcepto de eksterlandaj prelegantoj en la Hérouvila grupo.
(5an de januaro kun Mikaela Bronŝtejn)



Dank'al Catherine **DOMINGO** de la 2a de marto ĝis la 3a de aprilo okazas ekspozicio en la urba biblioteko (libroj + la 12 asociaj paneloj) en **Saint Pierre de Varengeville** (2.500 loĝantoj) apud **Duclair** (76) + okazos informa kunveno la 22an de marto. Legu ĉi-supre la anoncon kiu aperas ĉe la oficiala urba Internet-paĝo.

## NI SERĈU LA FRANCAJN VORTOJN

En antaŭa numero de nia normanda bulteno, ni proponis dudek tre facile kompreneblajn vortojn de esperanto, kaj petis de la legantoj ilin traduki per **ununura samsignifa franca vorto.**

Jen nova dudeko da esperantaj vortoj, kun sama demando. La solvojn vi trovos en la lasta paĝo de tiu bulteno :

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Dusencaĵo | *Medalistiko* | Ekzekutistino | *Suferegigi* | Senvosta |
| *Vinistiko* | Fratinmurdo | *Bestoforma* | Kola | *Diurno* |
| Forŝoviga (amuleto) | *Anĝelapero* | Rubema (planto) | *Pruvkomenco* | Sonĝa |
| *Rubaĵpentristo* | Akuŝadakceliga | *Mizerulnutrejo* | Piedfetora | *Konstipotimo* |

***Henri ROUSSEAU***

# ESPERANTO - NORMANDIE

***Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures***

esperanto Normandie

## ***Jen la solvoj de la antaŭa paĝo :***

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Amphibologie | *Phaléristique* | Bourrelle | *Excrucier* | Anoure |
| *Œnologie* | Sororicide | *Thériomorphe* | Cervical | *Nycthémère* |
| Apotropaïque | Angélophanie | Rudéral | Adminicule | Onirique |
| *Rhyparographe* | Ocytocyque | *Ptochotrophe* | Pododysodique | ..... |

*kaj la plej bela, konservita por la fino :* **Apo**patho**dia**phulato**phobie** !

Tiu lasta vorto ne troviĝas en la surpaperaj francaj vortaroj, sed abunde ĉeestas en interreto. Kelkaj el ĝiaj aspektoj pensigas ke ĝi estis kreita ne tre serioze sed pro ŝerco :

**Apo** = for = away - **patho** = malsano, ne taŭgas tie ; devus esti « pato » kiu kun apo, provizas « apopateo » = mi iras feki (mi formarŝas) (la radiko « pat » estas tiu de la angla « path » = chemin. Nota : péri**pat**éticienne : celle qui marche tout autour).

**Dia** = tra, à travers (diamètre = mesure en travers). Estis aldonita ŝajne nur por iom plilongigi la vorton, sed sen vera alporto.

**Phulato** : konservado, reteno. (vidu : prophylaxie) - **phobie** : crainte.

*Povas esti ke vi ne trovos kelkajn el la ĉi suprajn francajn vortojn en la vortaroj, eĉ plurvolumaj. Fakte, la eldonistoj je ĉiu nova eldono, malaperigas vortojn kiujn ili konsideras kiel ne tre utilajn, pasintecajn, por fari lokon sen pliaj paĝoj, al diskutindaj kaj efemeraj modernaj vortoj. Ili tiel definitive kondamnas tiujn vortojn, malriĉigas la francan lingvon, malebligas la facilan komprenon de malnovaj verkoj, kaj pligrandigas la fosaĵon inter la generacioj. Sed jes ja, la rhyparographie de Pline doit céder la place au tag.*

***Henri ROUSSEAU***

## Kotizo por 2013

Faru vian ĉekon profite de:

ESPERANTO-NORMANDIE

*CCP 283 40 H ROUEN*

Abon-kotizo por 2013 : 8 Eŭroj,

kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand,

2 Résidence Les Terres Quemines.

76113 Hautot-sur-Seine.

Antaŭdankon pro via subteno !

Nova esperant-lingva albumo de « TINĈJO » aperis. Vi povas mendi ĝin ĉe : Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris. Prezo : 12,50 € + 3,50 € por sendkostoj.




Elkoran dankon pro viaj amikaj leteroj, poŝtkartoj, retaj mesaĝoj por la novjaro. Via kasisto memkompreneble reciprokas !

La Tria « Tinĉjo » eldonita en Esperanto post : « La nigra insulo » kaj « Tinĉjo en Tibeto »